

Pri la romano « La Litomiŝla Tombejo »
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 531, 1981.11.12 & 14

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Mi nuntempe legas ege originalan romanon, kiun eldonis ĉijare Arthur E. Iltis en Saarbrücken.

A.- Ĝia aŭtoro: la ĉeĥo, Karolo Piĉ. Ĝia titolo; La Litomiŝla Tombejo.

C1.- Antaŭ ol recenze raporti pri tiu ĉi verko, kiu tutcerte neniun lasos senreaga, jam nur pro lingvaj demandoj, ni legos al vi kelkajn ĉapitrojn.

A.- Sed ni devos interrompi tiun ĉi legadon pro leksikaj demandoj. Kiel vi konstatos, Karolo Piĉ forĝis neatenditajn neologismojn, kies signifon ni nepre devos klarigi. En venonta elsendo ni ekzamenos tiujn ĉi vort-proponojn, sed antaŭ ol tion ĉi fari, ni opinias, ke unue oni devas iom kutimiĝi al la lingvo kaj stilo de Karolo Piĉ, kaj al liaj temoj.

C1.- Jen do unua citaĵo:

A.- "Vi ne plu sentas vin hejme en la fiŝistejo. Ĝia nova direktoro estas hundo kaj hieno. Antisocia elemento.

C1.- Antisocia signifas kontraŭsocia.

A.- "Antisocia elemento. Tipa produkto de la tempo. La epoko lin levis el polvo kaj koto. Ĝi lin altigis. Sed ĝi ne ŝanĝis lin. Li restis etburĝo, kiu neniam ĉesis honti pri sia antaŭurba, duonproleta, duonkampista deveno. La politikon li kaptis kiel bonŝancon kaj kiel vojon al kariero kaj profito. Tiurilate li ne miskalkulis. Kompreneble ankaŭ tio ne estis senpaga. Ne, li ne elspezadis monon por tio. Li pagis alimaniere. Per la propra memo, se entute li havis memon.

C1.- "Li fariĝis karaktera ruino. Li ellernis haltadi antaŭ neniuj kaj nenio. Unualoke li forĵetis la moralon. El ĝiaj principoj li retenis nur unun, la principon ne havi ian ajn principon.

A.- Vi rimarkis ke Piĉ akuzativigas unu, dirante unun.

C1.- Eĉ ĝiaj principoj li retenis nur unun, la principon ne havi ian ajn principon. Kaj skrupulojn? Tiujn li perdis jam malnelge.

A.- **Nelge** signifas **antaŭ nelonge**. **Malnelge** do signifas **antaŭ longe**. **Tiujn li perdis jam malnelge** do signifas **Tiujn li perdis jam antaŭ longe**.

C1.- "Kaj skrupulojn? Tiujn li perdis jam malnelge. Dumire. Deale, forsin, tamen li eksentas ian vakuon post ili.

A.- Jen novaj vortaj malfacilaĵoj, kiujn ni klarigu:

C1.- En la lingvo de Karolo Piĉ **deala** estas kunmetaĵo de **de-** al kaj **-a**. **De-al-a** do signifas detempaltempa.

A.- **Forsin** signifas **eble**.

C1.- **Deale, forsin, tamen li eksentas ian vakuon post ili** do signifas tute simple:

A.- De tempo al tempo, eble, li tamen eksentas ian vakuon post ili. Ni plue citu :

C1.- "La tradician dekalogon li do anstataŭigis per la nova. Kaj jen ĝiaj kolonoj! Korupto ! Kial ne, se ĝi alportas gajnon kaj akiron? Mensogo! Donadi la vorton kaj neniam ĝin teni. Karaktera kurbeco ! Promesadi, sed ne plenumadi. Trompo! Ion diradi kaj ion alian praktikadi kaj faradi. Denunco! Nenion konsideri sufiĉe naŭza kaj abomena! Manko de konscienco! Pretenco fari ĉion ajn.

A.-"Lia patro estis kampisto, avarulo, noktogardisto kaj krudulo. Multo el tio transiris ankaŭ en lin. La kampista monavido. Malsaneca, morba emo gajnadi kaj profitadi. Ĉiapreze! Etburĝeco. Regemo. Gardistaj supereco kaj spionemo. Etformateco kaj suspektemo. Malrespektado al la aliaj. Malfidemo. Apenaŭ kaŝata antisociemo. Kaj profunda izoliteco." Fino de la citaĵo.

C1.- Tiu ĉi portreto de la nova direktoro de fiŝistejo estas novtona en la esperanto-literaturo. La romano "La Litomiŝla Tombejo", kiel vi konstatas, estas iel soci-kritika. Kaj la priskribo estas drasta. Troviĝas en la verko de Karolo Piĉ kelkaj tiaj karakter-analizoj, kaj jam nur pro tio tiu ĉi libro estas leginda. La aŭtoro skribis pri bone vivantaj ĉeĥoj.

A.- Karolo Piĉ per aliaj priskriboj metas nin en precizajn etosojn. Jen ekzemple:

C1.- "La monaĥejo mutas kaj silentas. La olim fama piaristejo mortetas kaj lante velkas en nehaltigebla agonio.

A.- **Olim** en la lingvo de Karolo Piĉ signifas **jam antaŭ longa tempo, antaŭ longe: olim** ne estas samsenca kun **iam - en iu tempo. La olim fama piaristejo mortetas** do signifas La jam antaŭ longa tempo fama monaĥejo mortetas.

C1.- "La olim fama piaristejo mortetas kaj lante velkas en nehaltigebla agonio. Ĝia iama gloro estas apenaŭ io pli ol legendo. En la ĉeloj, koridoroj, salonoj kaj salonegoj moviĝas jam nur unu sola monaĥo, la rektoro, lia kvardekjara mastrumantino, kiu estas nevino de la ordena provinestro, kaj maljuna ĝardenisto, sakristiano kaj pordisto Antono. La rektoro pasigas la plejparton de sia tempo en gastejo. Antono senĉese grumbas kaj morozas. Kaj la nevino ĉiam nur parolas kaj babilas.

A.- "Sed se vi pacience elaŭskultos iun el la senfinaj historioj pri ŝia onklo la provinestro, kompanse ŝi pruntos al vi ŝlosilojn de tiu aŭ alia monaĥeja Dektria ĉambro. Kaj la Litomiŝla piaristejo havas multajn Dektriajn ĉambrojn!

C1.- "Jen la biblioteko, jen la morna Purgatoria kapelo, jen granda refektorio kun raraj bildoj kaj survolbaj freskoj, jen preĝejoj turoj, sakristio, oratorioj, kaj antaŭ ĉio kriptoj, en kiuj polviĝas la Valdštejnaj nobeloj kaj nobelinoj. La plej impona estas la imperiestra generalo grafo Georgo Jozefo. Li kuŝas en kverka ĉerko, en brila generala uniformo. Li surhavas blankan jakon kun oreaj butonoj kaj kolumo...

A.- En la lingvo de Karolo Piĉ la sufikso **-e-** signifas – **kolora. Oreaj butonoj** signifas do **orkoloraj butonoj**.

Cl.- "Li surhavas blankan jakon kun oeraj butonoj kaj kolumo, ruĝan pantalonon kaj altajn nigrajn botojn. Transe de li dormas Henrieta grafino de Valdštejno. Ŝi mortis post akuŝo, aĝa nur dudekdu jarojn. Ŝi tenas la infanon surbrake, kaj ak en la ĉerko ŝi aspektas kiel Madono.

A.- **Ak** plifortikigas la signifon de kaj.

C1.- ... "kaj ak en la ĉerko ŝi aspektas kiel Madono. Malgraŭ 115 jaroj, kiuj pasis dume, ŝi ne perdis siajn homajn trajtojn.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras : Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*